















- Harz
- Nacia Parko
- Urbo
- Akvejaro
- Federacia strato
- Strato
- Fervojo
- Naciparka Domo
- Parkvartista stacio
- Naciparka klerigcentro
- Naciparka junular-domo
- Naciparka informejo
- Arbara restoracio
- Senbaraja pado
- Bostrika pado
- Leontoda esplorpado
- Animpado
- Praarbara pado
- Arbara promenvojo
- Sovaĝeja pado
- Linkejo
- Urogalejo
- Sovaĝbest-observejo
- Brocken-ĝardeno
- Natur-mita pado



**Pliaj ofertoj**

Krom la natura rezervejo, estas alia emfazinda afero de la laboro de la Nacia Parko Harz; kaj tio estas ... vi, la vizitanto! Ni, ĉi tie en la Nacia Parko Harz volas, ke vi kolektu kiom eble multe da impresoj de la parko. Nia teamo pretas oferti konsilojn kaj helpon kiam necesas. Kontaktu unu el la multaj parkvartistoj aŭ volontulaj gvidantoj de la Nacia Parko. Akceptu niajn ofertojn pri ekologia edukado, kaj donu al ni viajn opiniojn koncerne niajn vizitanto-centrojn kaj ekspoziciojn.

Detalajn kaj aktualajn informojn vi trovos en nia program-broŝuro „Naturerlebnis“ (natur-travivaĵo), kiu estas eldonita ĉiujare kaj enhavas adresojn kaj aliajn informojn pri la Nacia Parko. Aldone al informoj por individuaj vizitantoj, vi ankaŭ trovos informojn pri grupaj aktivecoj, kaj detalojn kiel registriĝi al tiaj grupoj.

---

Je la suda rando de la Nacia Parko Harz situas **Herzberg am Harz...la Esperanto-urbo**, kiu ekuzis tiun kromnomon en la jaro 2006. En la urbo ekzistas multaj esperantorilataj servoj, dulingvaj vojmontriloj, ekspozicia salono en la kastela muzeo, Germana Esperanto-Centro kun granda biblioteko, Zamenhof-monumento, ktp.



LEGENDA MONTARA SOVAĜEJO

# Nacia Parko Harz

Nationalpark Harz



**Bonvenon en nia legenda montara sovaĝejo!**
Surpriziĝu kaj spertu diversan kaj originalan montaran pejzaĝon. Migradu tra la densaj folio- kaj pingloarbaroj, inter nudaj rokoj aŭ laŭlonge de rokoj. Aŭskultu la silenton de la marĉoj aŭ la vokojn de la nigra pigo kaj la troglodito. Ĝuu la atmosferon de la monto-rojoj, kiam ili fluas trans kaj inter ŝtonegoj suben al la valoj. Ĵetu rigardon al mirindaj pejzaĝoj kaj finfine kunsentu kun la naturo, kiam vi havas la bonŝancon vidi la legendan pinton de Brocken [broken] je 1141 metroj super la marnivelo.
Famaj personoj vojaĝis jam tra la Harz [harc]. Goethe [gete], la verkisto kaj poeto, grimpis Brocken trifoje. Heinrich Heine rakontis pri sia „Harz-vojaĝo“ kaj la fama esploristo Alexander von Humboldt migris tra la regiono dum siaj studoj en Göttingen [getingen] - observante ĉion kaj akirante spertojn.
Severa klimato kaj plurfaceta geologio formis ĉi tiun mezmontaron, la plej nordan en Germanio. La pejzaĝo de Harz certe faros vian viziton al tiu plej granda arbara nacia parko en Germanio, aparte emocia kaj persona sperto.

**La Nacia Parko**
La Nacia Parko Harz estiĝis en 2006 post la kuniĝo de du tiamaj naciaj parkoj: la Nacia Parko Hoch-Harz [alta Harco] en Saksio-Anhaltio, kiu estis establita en 1990, kaj la Nacia Parko Harz en Malsupra Saksio, kreita en 1994. La nuna Nacia Parko kovras preskaŭ 25 000 hektarojn.
Naciaj parkoj estas protektataj lokoj kun longa tradicio. La unua estiĝis en 1872, kiam la Yellowstone [jelostón] Nacia Parko estis kreita en Usono. Hodiaŭ estas ĉirkaŭ 2000 naciaj parkoj tutmonde, el kiuj 14 troviĝas en Germanio. Jam en la fino de la 19-a jarcento oni planis krei protektitajn lokojn ene de la Harz-regiono.

**Kiuj estas la taskoj de nacia parko?**
Ĉefe temas pri la protekto de naturaj procezoj, konforme al la devizo de naciaj parkoj „Lasu la naturon esti naturo!“. Tiamaniere valoraj vivejoj por multaj kaj ofte raraj besto- kaj planto-specioj estas aktive protektataj aŭ evoluigataj. Homoj ne estas ekskluditaj, tamen: malstreĉiĝo konforme al naturo, ekologia edukado kaj sciencaj rigardo kaj esploro estas gravaj taskoj de naciaj parkoj.



**La Nacia Parko Harz kaj ĝiaj celoj**
Ankaŭ en la Nacia Parko Harz protektitaj vivejoj rajtas trovi kaj evoluigi sian propran naturan dinamikon.
La vivo-procezoj ene de la marĉoj, ene de la diversaj arbaro-strukturoj, ene kaj rande de la montaraj rojoj, laŭ la krutaĵoj kaj inter la nudaj rokoj, kaj en la senarbara erikejo de Brocken ĉiuj rajtas ekzisti nedifektite, sen homa entrudo.
La esplorteamo de la Nacia Parko Harz superrigardas ĉi tiujn procezojn. Krome ĝi agas, kie homoj en la pasinteco trudis la naturajn procezojn, pere de renaturigaj kaj regeneraj projektoj, kiel la replenigo de marĉoj, renaturigo de montaraj riveretoj, kaj projektoj ene de la arbaro. Unika ene de la germanaj naciaj parkoj estas la resovaĝigo de la linko.
Plia emfazo de la laboro estos montri al la publiko la veran belecon de netuŝita, sovaĝa naturo. Kadre de pli ol 2500 ĉiĉeronataj vizitoj jare, parko-vizitantoj povas studi la okazantajn naturajn procezojn. Alternative, vizitantoj povas mem esplori la parkon uzante bone markitajn vojojn, aŭ vintre laŭ longdistancaj skispuroj.

**Arbara Nacia Parko**
La Nacia Parko Harz estas la plej granda arbara nacia parko en Germanio. Grandaj sovaĝaj bestoj, kiel ruĝa cervo, kapreolo kaj apro vivas en la arbaro. Oni povas trovi diversajn arbarstrukturojn: malsupre troviĝas ruĝfagaj arbaroj, pli alte miksitaj arbaroj kun fagoj kaj piceoj, kaj je la plej altaj altitudoj la unikaj montaraj piceaj arbaroj.

**La supro de Brocken**
Unike por germana mezmontaro, la vegetaĵaro sur la supro de Brocken estas nature senarbara. La ŝtormoj kiuj blovas super la altebenaĵo je 1100 m ne permesas al la arboj kreski. Sur la supro nanaj arbustoj supervivas en la seka herbejo.

**La mirindaj marĉoj de Harz**
La marĉoj de Harz restis netuŝitaj. Hodiaŭ ili havas signifon por tuta Eŭropo rilate naturprotektadon kaj sciencon. La marĉoj evoluis pro apartaj klimataj kondiĉoj: post la lasta glacia epoko, humida kaj malvarmeta klimato kaj ŝtona subgrundo kreis lokojn de alta akvo-saturiĝo, kie herboj povis putriĝi nur parte. La mortinta torfa musko laŭpaŝe transiris al torfejo kiel konata hodiaŭ; iuj marĉoj atingis profundon de pli ol 7 metroj.



**Libere fluanta akvo**
Klaraj montaraj rojoj troviĝas ĉie en la Nacia Parko Harz. La konstante kurantaj rojoj faladas malsupren - per praa potenco, precipe dum inundoj. La riveretoj montras diversajn strukturojn: apud la fonto, en la supraj lokoj troviĝas plejparte grandaj rokoj kaj ŝtonegoj. Tiuj supraj lokoj estas hejmo de tre specialaj insektolarvoj. Interesaj birdoj, kiel cinkledo kaj griza motacilo estas loĝantoj de tiu aparta biotopo.

**Rokaĵoj**
En multaj lokoj la arbara pejzaĝo estas interrompita de surprize formiĝintaj izolitaj rokaĵoj kaj klifoj, sovaĝaj kaj kvazaŭ malorde kunĵetitaj. Jen la sfero de raraj muskoj kaj likenoj, kio memorigas al la altaj Alpoj aŭ al la Arkto-regiono.


**Pres-indikaĵoj**
Nationalpark Harz, Lindenallee 35, 38855 Wernigerode
Telefono 0049 3943 55020, Fakso 0049 3943 550237
poststelle@nationalpark-harz.de, www.nationalpark-harz.de

Traduko: Esperanto-Centro Herzberg
Fotoj: U. Anders, G. Friederici, Harzer Tourismusverband / M. Gloger, S. Kankowski, Dr. G. Karste, I. Nörenberg, W. Rolfes, K. Schünke, F. Seifert, T. Stephan, W. Störmer, S. Wielert, C. Wiesel, W. Wimmer, www.zeitwildnisharz.de / Bildidee: S. Sobotta
Mapo: cognitio - Kommunikation und Planung, Verlag, Niedenstein

2013





